pensis ŝi "ĝis la oreloj aperos, aŭ almenaŭ unu el ili."

Post unu minuto jam aperis la tuta kapo. Alicio demetis sian fenikopteron, kaj komencis doni plenan raporton pri la ludado, ĝojante, ke nun ŝi havas atentan aŭskultanton. La Kato ŝajne opiniis, ke jam estas videbla sufiĉe da lia korpo, kaj li aperigis nenion plu.

"Laŭ mi, oni ludas tre maljuste" diris Alicio per iom plenda voĉo "kaj ĉiuj tiel laŭte malpacas, ke mi ne povas aŭdi mian propran voĉon; oni ne havas definitivajn regulojn, aŭ se ekzistas tiaj, oni ne atentas ilin. Ankaŭ vi ne povas imagi kiel konfuzige estas ke ĉiuj ludiloj — pilkoj, arkoj, k.t.p. estas vivaj. Ekzemple, jen la arko kiun mi devas celi promenas ĉe la alia bordo de la ludejo; kaj ĵus kiam mi volis martelumi la pilkon de la Damo, ĝi forkuris de la mia!"

"Ĉu vi trovas la Damon agrabla?" diris la Kato per mallaŭta voĉo.

"Tute ne" respondis Alicio. "Ŝi ja estas tiel ekstreme——"

En tiu momento ŝi rimarkis ke la Damo staras malantaŭ ŝi kaj aŭskultas, do ŝi daŭrigis: —— "lerta kaj trafema, ke neniu alia havas eĉ la plej malgrandan venkŝancon."

La Damo ridetis afable kaj preterpasis!

"Kiun ajn vi alparolas?" diris la Reĝo,



alvenante antaŭ Alicion, kaj rig
malfermitaj okuloj la Katkapon
"Unu mian amikon" Alicio ĝ
"Permesu ke mi prezentu al v
Katon."
"Mi tute ne aprobas ĝian asp
Reĝo "tamen se al ĝi plaĉos,
ĝi kisi mian manon."
"Tio *ne* plaĉas" diris la Kat
La Reĝo metis sian reĝan k
tekto malantaŭ Alicion.
"Vi ne insultu" diris li el ti
—— ne rigardu min."
"La Kato ja *rajtas* rigardi vi
"Tion mi certe legis en iu libro
povas rememori la titolon."
"Tamen ĝi devas esti forn
Reĝo fortemfaze. Kaj alvokint
en tiu momento preterpasas,
diris li "ke vi, karulino, formov
Por forigi ĉiujn malagrabla
ĉu trivialaj, la Damo ja havis
rimedon. "Senkapigu ĝin"
turnante la kapon por rigardi.
"Do, mi venigos mem la ekz
la Reĝo, kaj tiucele li tuj rapid
En tiu momento Alicio ekaŭ
la Damo, kiu malproksime

[1] "Eĉ Kato rajtas rigardi Reĝon" est

LEWIS CARROLL La Aventuroj de Alicio en Mirlando Esperanto translation (Illustrated by Brinsley Le Fanu) LONDON, 1910 THE BURST